Om onze ijverige sekretaris, den heer Jos Van Deun wat te ontlasten van de steeds aangroeiende bezigheden, welke de uitbreiding van ons Verbond medebrengt, hebben wij de gewaardeerde medewerking verkregen van een onzer ijverigste pioniers n.l. Kapitein Vangeel, die voortaan de propaganda zal verzorgen bij *niet-Expectantisten*. Wij sporen dus al onze officieele afgevaardigden aan, voortaan aan alle buitenstaanders volgend adres op te geven, waar zij alle inlichtingen en documentatie kunnen bekomen : *Katholiek Vlaamsch Esperanto Verbond, Algemeen Bestuur, Bonheiden*.

Ook de in 't Nederlandsch opgestelde propagandaartikels voor lokale dag- en en weekbladen moeten in het vervolg dit adres vermelden en dus niet meer ons secretariaat Turnhoutschebaan Borgerhout.

## NOVA GRUPO.

En Weelde fondiĝis nova Esperantogrupo. Du el tiu grupo jam aliĝis al FUKÉ. Ni esperas baldaŭ bonvenigi ĉiujn ĝiajn membrojn en nia FUKÉ-familio.

## NOVAJ DELEGITOJ.

Niaj fervoraj limburgaj amikoj, K. Dubois en Bilzen kaj Jos Smets-Box en Tongeren, deklaris sin pretaj esti niaj delegitoj. Ni volonte akceptas ilin kaj deziras al la novaj delegitoj belegan sukceson en Limburgo.

## EL GEEL.

Oni skribas al ni el Geel jenon.

La bone konata Gela Esperanto Grupo estas tre grave trafita. Ĝia prezidanto ne plu estas. Sabaton la 21an de Januaro li ankoraŭ prezidis la estrarkunvenon, kaj aranĝis diversajn aferojn por la venontaj semajnoj, kiujn li bedaŭrinde ne plu povos efektiviĝi. Dimanĉon 22 januaro li veturis per aŭtomobilo kun siaj infanoj

hejmen, post vizito de sia tre malsana bopatro. Sed dumvoje la aŭtomobilo koliziis al arbo kun la malfeliĉa sekvo ke li kaj unu el liaj infanoj estis sammomente mortigataj. Liaj aliaj infanoj estis grave vundataj.

La enterigo de nia prezidento okazis jaŭdon 26 januaro. Multnombraj estis la konatuloj kaj amikoj de la mortinto kiuj sekvis lian mortrestaĵon. Ankaŭ niaj membroj kaj la Esperantogrupoj el Mol kaj Turnhout akompanis lin al lia lasta ripozejo. Apud la tombo G.E.G.-ano faris funebran paroladon.

G.E.G. ĉeestos kelkajn sanktajn mesojn, la plej bona rekompenco kiun nia grupo povas doni al li por lia fervora laboro. Certe li vivos ankoraŭ longe en nia memoro, ĉar li estis persono kun eksterordinare multaj bonaj kvalitoj. G. E. G. petas al la aliaj FUKÉ-anoj ke ili rememoru ĝian prezidanton en siaj preĝoj.

M. G.

## EL TONGEREN.

En Limburgo nia movado bone progresas. La tre laborema kursgvidanto, S-ro K. Dubois, el Bilzen, sukcesis organizi en nia provinco jam 5 kursojn kiuj ĉiuj havas grandan nombron da partoprenantoj. Ankaŭ en Tongeren la kurso bone sukcesis, ĉar 15 gelernantoj regule ĉeestas la tre interesajn lecionojn. Inter tiuj estas la prezidanto kaj kelkaj anoj de la loka Kat. Laborista Junularuniĝo (K.A.J.)

J.S.-B.

Ni esperas ke en Tongeren baldaŭ ekostos forta vigla FUKÉ-sekcio.

## NIEUW FUKÉ-LIED.

Het zal onze leden een genoeggen zijn te vernemen dat een schoon FUKÉ-bondslid in voorbereiding is, dat door een bekend componist zal getoondicht worden.

Een bondsvlag en een bondslid zullen nog meer vuur en prestige brengen in onze steeds bloeiende organisatie. Het zou dan ook zeer jammer zijn indien we niet nog voor ons wereldkongres een schoon bondsvlag konden laten maken, wegens gebrek aan belangstelling bij onze leden.

## SEKVINDA EKZEMPLO.

Nia ano en St. Niklaas, S-ro A. De Bos-

schere, elpensis bonan propagandan rime-  
don, kiun ni rekomendas al ĉiuj niaj anoj  
kiuj havos saman okazon. En la programo  
de festo, aranĝita de la Kant-kaj Teatra  
asocio (de la kongregacio de geedzoj), li  
metis sur du tutaj kovertpaĝoj fragmen-  
tojn el la artikolo « Waaron een Katho-  
lieke Esperantobeweging? » (F. K. no.6,  
1938) sub grandlitera titolo « Weest Ka-  
tholieken met de daad ». Tio estas certe  
efika propagando, pro kiu elpenso ni kore  
gratulas lin.

### FLAVA BROŝURO.

Jus eliris la dua eldono de tiu trafa bro-  
ŝuro kies unua eldono informis tiom da  
interesuloj pri nia Unuiĝo kaj la katolika  
Esperanto-movado. Ĝi estas senpage ha-  
vebla ĉe Kapitano P. Van Geel, Domis de  
Semerpontlaan 26, Bonheiden. Tiuj kiuj  
jam mendis, baldaŭ ricevos la demandi-  
tan kvanton. Samformata broŝuro, enha-  
vanta la prezliston de nia Katolika Espe-  
ranto-Instituto, ankaŭ ĵus eliris. Havebla  
ĉe la sama adreso.

### DANKO.

Ni ĉi tie kore dankas la amikojn kiuj  
respondis la alvokon en la antaŭa numero  
de nia revuo pri sendado de malnovaj nu-  
meroj de Flandra Katoliko al nia sekre-  
tariejo.

### ESPERANTO-TAGO EN MOL.

Dimanĉon la 29-an de Januaro okazis  
Esperanto-tago en Mol. Malgraŭ komple-  
ta manko de intereso flanke de la grupoj  
el la ĉirkaŭaĵo, nia tago iĝis vera sukceso.

Je la 11-a horo nia Prezidanto bonve-  
nigis la partoprenantojn en la klubejo,  
je kies fasado verda stelo gaje flirtis.

Post iom da babilado, ni vizitis grupe  
la famkonatan ĉi tian lanfabrikon, sub  
la lerta gvidado de la fabrikanto mem.  
Nia Prezidanto kore dankis S-ron Van  
Dooren pro lia afableco kaj promesis no-  
me de ni ĉiuj, propagandi lian fabrikon.

En la « Flandra Domo » tagmanĝo aten-  
dis nin. Ni malsatis ... do ni ŝatis la bon-  
gustajn pladojn. Bonhumora babilado kaj  
kantado agrabligis la tagmanĝon kaj estis  
baldaŭ la 3a kiam sekvis vizito al la ekspo-  
zicio de nia fama Mola pentristino. Sinjo-  
rino Van Rompa. La artistino nin bonve-

nigis laŭ sia kutima afableco. Ni admiris  
la vere artajn pentraĵojn kaj nenio pli  
bone montris la kontentecon de la vizitan-  
toj ol la beleta sumo, kolektita intence de  
la aĉetado por la preĝejo de Ezaert (nova  
parohoj de Mol) de la pentraĵo: « Krist-  
nask-Nokto en Kampino ».

Je la 5-a, la salono de « Flandra Domo »  
estis preskaŭ plena de interesuloj. Nia  
teatraĵo « La Unua », skizo verkita de nia  
grupano Sinjoro Vos, estis plena sukceso  
kaj rikoltis meritan aplaŭdon.

Post la teatraĵo oni disvendis loteri-  
biletojn, kvazaŭ ili estus senpagaj: la  
loterio ja valoris la elspezon.

Post la lotumado sekvis gaja, intima  
kunveno, agrabligita per belega muziko  
de la « Kvar ŝipanoj ».

Kiam denove simila agrabla festeto?  
oni demandis.

(Ĉeestintino)

Ni kore gratulas niajn geamikojn el  
Mol kiuj kuraĝe kaj entuziasme aranĝis  
tiun Esperanto-kunvenon, kaj nur bedaŭ-  
ras ke tiom da samkredanoj forrestis.  
Nu, laŭ atesto de nia delegito Kapitano  
Van Geel, la festeto brile sukcesis, kaj ni  
kore ĝojas pro tio.

### SUBTENO F. U. K. E.

Por ke nia kongreso sukcesu (Malfeli-  
ĉulo kiu pro cirkonstancoj ne povos  
partepreni 30.--  
Fuke Antaŭen (D.J.) 10.--  
Por Flandro katoliko. J. D.-L. - Geluwe 5.--

### RADIO-PAROLADO EN K. V. R. O.

La 2-a Februaro parolis en K.V.R.O. nia  
Prezidanto. Laŭ la envenintaj leteroj el  
diversaj urboj kaj vilaĝoj, eĉ el eksterlan-  
do ni povas diri ke tiu parolado vekigis  
intereson ĉe multaj. La parolado precipe  
temis pri « Esperanto en la literaturo kaj  
muziko » Ni aŭdis belajn poemojn de Gui-  
do Gezelle, Esperantigitajn de nia ano  
S-ro Vermuiten kaj novajn diskojn kies  
bela muziko vere mirigis nin. Sekvis kel-  
kaj sciiĝoj pri nia XXI-a kongreso.

Estis grava vespero por F.U.K.E. kaj  
Esperanto, kiun ni ŝuldas al la senlaca pre-  
zidanto de nia Unuiĝo. Ni tial kore gra-  
tulas kaj dankas Lin.

### DISTRA PAĜO.

Ni denove priatentas niajn anojn kaj pre-

cipe niajn grupojn pri la valoro de nia  
enigmaĵoj. Flanke de la instrua valoro, la en-  
sendo de la solvoj ankaŭ donas la eblecon  
gajni belan premion, kiu certe estos bona-  
vena ĉe ĉiuj. La sekcioj povas bloke en-  
sendi la nomojn kaj nur po partoprenan-  
to aldonu 0.75-a p.m.

FUKEanoj multnombre partoprenu kaj  
bonan ŝanĉon!

### ESPERANTO-DISAŬDIGO

#### EN LOKSBERGEN.

Tiu disaŭdigo, prozorgota de la Gela  
Esperantista Grupo, estis planita por la  
11-a de Februaro. Pro la morto de ĝia Pre-  
zidanto oni estis devigata ĝin prokrasti.  
La G.E.G. intertempe intertraktas kun  
V. O. Loksbergen por fiksi postan daton.

Jen la programo. Ĉio estas esperant-  
lingva.

- 1) Nia Sinjorino de Flandrujo.
- 2) Korte toespraak door den Voorzitter  
van G. E. G.
- 3) Zeg kwezelke wilde gij dansen?
- 4) Korte toespraak.
- 5) La Tilio.
- 6) Dialoog.
- 7) Splinternieuw marschlied van G. E. G.
- 8) Korte vertelling over Ste. Dimphna,  
Patrones van Geel.
- 9) Duo, Eere aan Ste. Dymphna.
- 10) Slotwoord door den Voorzitter.
- 11) La Espero.

Al niaj amikoj el Geel ni deziras plenan  
sukceson.

### De nia Vendinstituto.

Mi nepre volas atenti niajn anojn ke  
aperis antaŭ mallonga tempo oficiala vor-  
taro kun klarigoj en Esperanto (Beknopt  
Esperanto verklarend Woordenboek). Ĝi  
ne estas do simpla traduko de la vortoj,

sed *klarigo*. Tio certe helpas al multaj por  
uzi la ĝustajn vortojn. Jam aperis granda  
standarda verko sur tiu kampo, nome  
« PLENA VORTARO », kostanta fr.70.--.  
Sed kompreneble ne ĉies monujo kapa-  
blas toleri tian elspezon.

Tial unu el la kunlaborintoj de la Plena  
Vortaro, S-ro Grenkamp-Kornfeld, kom-  
prenis ke necesas pli malmultekosta eldo-  
no, tamen pli konciza. Li mirige sukce-  
sis en sia klopodo kaj aperigis pasintjare  
tiun interesan kaj nemankipovan libron.

Ĝia prezo estas ege malgranda kompare  
al la kvalito. Ĉies monujo povas su-  
feri elspezon de Fr. 20.--. Nia stoko estas  
tre limigita kaj tial ni konsilas al niaj  
geklintoj ke ili tuj pagu je la poŝtĉekkon-  
to No. 1194.82 de D. Mortelmans, 14,  
Egied Segerslaan, Wilrijk, la indikitan  
sumon, *sen ia plialtigo*, kun dorsflanka in-  
diko sur la pagilo « por Vortaro Oficiala  
de Grenkamp ». Ĝi estos tuj sendata al vi.

### EN LA F.U.K.E.-FAMILIO.

#### KONDOLENCJOJ.

† Dolora bato trafis la Gela Esperantista Gru-  
po'n. Ĝi perdis sian Prezidanton, S-ron J. De  
Laet kiu akcidente mortis.

Nome de Fuke ni sendis jenan kondolencte-  
ron:

„Waarde Geloofsgenooten,  
Met ontroering hebben wij het tragisch over-  
lijden vernomen van uw geëerde Voorzitter, den  
Heer Joz. De Laet en diens zoonje en bieden U  
hierbij onze oprechte gevoelens van christelijke  
deelneming aan, in de zware slag die uw club  
treft, vertrouwend dat de Goede God zich reeds  
over Hem ontfermd heeft omdat Hij was: van  
goeden wil en beziel met daadwerkelijke naasten-  
liefde.

In naam van ons Katholiek Vlaamsch Espe-  
ranto Verbond, vragen wij U onze innigste deel-  
neming te willen overmaken aan de zoo diep  
beproofde familieleden van dit dubbel sterfgeval,  
en de verzekering dat wij voor de zielerust van  
hun dierbaren zullen bidden.

† En Aalst mortis la 26an de Februaro Sinjo-  
rino Maria Emilia Verspaille-Daneels, Patrino de  
nia membrino Maria Verspaille.

† En Ostende nia fervora delegito M. Hessens  
perdis sian bopatrinojn, sinjorinojn Maria Johanna  
Corveleijn, kiu forpasis el la vivo la 1an de Marto.

FUKE prezentas al tiuj anoj kaj iliaj familioj  
siajn sincerajn kondolencojn kaj petas preĝojn  
por la karaj mortintoj.

VOOR UWE

**Parketvloeren, Linoleums,  
Meubelen en Marmers**  
VRAAGT DE ALOMGEKENDE  
**BOENWAS GLIMO**

Firma Corstiaens - Neefs

St-Antoniusstraat, 12-14, Antwerpen



## KION ALIAJ SKRIBAS?

### EVANGELIO KAJ SOCIO.

Tiu nova gazeteto eldonata de J. Bruyn, unu el la fondintoj de la socialista unuiĝo « F.L.E. » alcelas unuiĝon de Kristanismo kun socialismo, ĉar kiel « Laborista Esperantisto » rimarkas « la redaktoro montras ke socialismo kaj Kristanismo ne estas kontraŭaĵoj, sed ke la amo al la homo kiu manifestas sin en la socialismo, kaj la amo al Dio en la religio estas du fluoj el unu fonto ».

Sendube la redaktoro Bruyn havas sinceran bonan intencon, komprenante finfine ke la vera socia vivo ne havas fundamenton krom en la religio kaj ke daŭra socia ordo sen religio estas neebla. Li tamen montras en sia gazeteto malbone koni la Kristanisman, ĉar se li opinias ke la amo al la homoj estas propra eco de la socialismo, li pruvas ne scii ke la amo al la homoj, kiu estas instruata en la socialismo, havas sian originon en la Kristanismo, kiu antaŭ Marx instruis ke la homoj estas fratoj. Ne, la amo al la homoj ne estas eltrovaĵo de la socialismo sed estas la karakteriza doktrino de la Kristanismo. Vera amo al la homoj ne havas sencon se oni ne akceptas la ekziston de Dio. Krom tio ... *fakte* la socialismo ne predikas amon al *ĉiuj* homoj sed nur al la laboristoj kaj semas malamon al multaj aliaj, instigante al klasbatalo.

En numero 2 de « E. Kaj S. » ni vidas artikolon de protestanto kiu refutas la rasismon kaj *troan* naciismon. Vere bona artikolo. Sed la artikolo « Torĉo » estas sensenca. Ĝi asertas kvazaŭ la Katolika Eklezio genufleksas al la ŝtataj potenculoj kaj ..... « fuŝinterpretis la Instruon de Kristo, ĉiam ŝultre je ŝultre starante kun la potenĉavantoj ». Vere estas ke multaj ŝtataj potenculoj misinterpretis la doktrinon de Kristo, mem estante nur nom-kristanoj. Sed ĉiu verema homo povas klare vidi ke ne la Katolika Eklezio cedas por la potenculoj sed estas ĉiam nur Ĝi kiu ĉiam klare, sentime sencede

fiksas sian starpunkton, deciditan laŭ la doktrino de Kristo kaj ne laŭ la volo de potenĉavantoj. Oni nur pensu pri la sinteno de la Papo Pio XI al Hitler kaj Musolini. Sed kelkaj malvasthorizontaj homoj postulas ke la Papo radikale parolu en kazoj, kiam Lia energia agmaniero kaŭzus pli multe da malbono ol da bono. Se la Eklezio vere ĉiam subtenis la potenĉavantojn Ĝi ne estus tiel ofte persekutata.

Alia artikolo « la socialaj tendencoj de la francaj Katolikoj » ŝajnas kvazaŭ nur la francaj katolikoj pravus rilate al sia socialaj opinioj kaj nur ili batalus kontraŭ la kapitalismo en la vera senco.

En la revuo estas ankoraŭ aliaj artikoloj priparolindaj sed ni bezonus por tiu tutan F. K. kaj pli.

Resume ni konsilas al la bonintenca eldonanto atente legi kaj studi la Papajn Enciklikojn « Rerum Novarum » kaj « Quadragesimo Anno » en kiuj li trovos sian celitan staton eksplikata kaj ankaŭ vidos ke la vera Socialismo (ne socialismo en la bona senco sed LA « Socialismo » de Marx) kaj vera Katolikismo ne estas unuigeblaj. Ni eĉ konsilas al li eldoni tiujn Papajn Enciklikojn en Esperanto, ĉar ili enhavas kvazaŭe la saman doktrinon kiun J. Bruyn deziras disvastigi per sia nova gazeto, kun la diferenco ke ili ne enhavas malveraĵojn.

### COMPRENDRE

Tiu revuo (antaŭe « Ĝis Mil ») eksplikas en sia Februara numero la motivon de sia nova nomo. Ni tradukas « kompreni estas la deziro de ĉiam pligrandiganta nombro da Francoj, precipe post la okazintaĵoj de lasta Septembro. Kompreni tion kio okazas pri nia lando, kompreni la mentalecon de la najbaraj popoloj, kompreni la sintenadon de ĉiu el ili rilate al ni, kompreni tion kio povas daŭrigi la pacon aŭ kaŭzi militon, jen la granda leciono memortenenda pro la agitaĵoj de la jufinita jaro. Kompreni tio estas en la estonto nia fervora celo. Tasko grandega malfacila, minacata de multaj embuskoj, sed tasko utila kaj nobla.»

Vere bela tasko, ni povas nur deziri ke ĉiuj homoj agnosku la belecon kaj senfinan utilon de tiu idealo: kompreni unu la alian. Nekompreno kaŭzas tiel ofte malpaceton, tiel ke oni diras pri du malkon-

kordantoj « ili ne komprenas unu la alian ».

Comprendre anoncas ke la klubo organizas grupvojaĝon al la internacia socialista Esperantokongreso en Kopenhago. Ĉu ili ankaŭ organizos grupvojaĝon al nia katolika internacia kongreso? Tie ili certe havos okazon por « kompreni » multan utilaĵon. Ni jam diras bonvenon al ili.

### FLANDRA ESPERANTISTO

La organo de Flandra Ligo Esperantisto komencis aldoni prilingvan parton kun la nomo « Flandra Studanto ». Tio estas kvazaŭ necesa parto en ĉiu nacia revuo, ĉar ni ĉiutage spertas ke multaj Esperantistoj ne sufiĉe scipovas la lingvon.

En la unua numero de FL. St. ni rimarkas tamen kelkajn neĝustaĵojn. Oni por

la prononcado de la v indikas: v = zoo-als in « water ». La prononco de la v estu tamen kiel v (kaj kelkfoje, kvazaŭ per si mem, duone kiel v duone kiel w, ekz. en « kvar »). Pri la prononco de la v, vidu FK no. 1 de la 3a jaro.

Ankaŭ neĝusta estas la regulo ke la sonoj estu prononcataj ĉiam mallonge. Per mallonga prononcado oni faras Esperanton por kelkaj naciaj malfacile komprenebla kaj krom tio prononci ilin ĉiam mallonge estas malbele. Tion vi rimarkos kiam vi prononcas ekz. « nomo », « bela » ktp. Tial laŭ Zamenhof oni prononcu ilin ĉiam *mezlonge*. Laŭ aliaj oni prononcu ilin kelkfoje longe, kelkfoje pli mallonge, laŭ la loko kiun ili okupas en la vorto. Ni ne ekspliku tion nun, sed diru nur ke la regulo prononci ilin ĉiam mallonge, estas certe neĝusta.

## REDAKLIA LETERKESTO

### KAT. E-RONDO, MORTSEL.

Dankon por via artikolo pri la Ligoj de S. Koro. Mi sendis Ĝin al la redakcio de Espero Katolika, ĉar Ĝi ne respondas al la celo de F. K. sed jes al tiu de E. K.

### JUUL REIN, MOL.

Pardonu ke via poemo ĝis nun ne aperis; kaŭzo estis i. a. eraro. Dankon por ĝi.

### J. SM-B., TONGEREN.

Kiel vi vidas en Nia Movado, la dua eldono de la flava broŝuro jam eliris. Dankon pro via humura rakonteto. Koncerne la aperadon de F. K. via deziro plenumata. Jam la Aprilnumero aperos en la unuaj tagoj de Aprilo, kaj de tiam ni esperas regule havigi ĝin al la legantoj en la komenco de la monato. Malsano kaŭzis la prokraston de tiu ĉi numero.

### M. D. V., GENT.

Amiko, bonvolu ankoraŭ fojon pardoni la prokraston de la respondo al via demando.

### F-INO DE ROP.

Dan kon pro viaj angla kaj flandra humuraĵoj.

### POR NIA FLAGO

Antaŭa sumo	fr. 270,00
P.P.-De C. en Hoboken	5,00
D. R. flegistino, Bruselo	10,00
Mi ne estas Sino sed Fino M. I. M. el St. H. H. VI.	5,00
La arbaramikoj, Buggenhout	25,00
Tropagita, F-ino M. D. C. el St. A.	10,00
K. R. E. el Mortsel	10,00
Jurgens V. el Borgerhout	5,00
Silkfadenoj el Antwerpen, F-ino Thijs,	6,85
Silkfadeno el Westmalle	4,25
F-inoj Thijs	6,85

Entute.....fr. 351,10

## HALLO!

Onze bondsvlag moet ten eerste een prachtige vlag zijn die de aandacht trekt, een kunstwerk, en ten tweede, ze moet plechtig gewijd worden op ons wereldkongres. Daarom, aarzel niet uw bijdrage te storten voor uw vlag.

Wegens plaatsgebrek en het feit dat het Aprilnummer spoedig zal volgen, verschijnt in dit nummer geen APERIS en geen DISTRA PAĜO.

kiun

ĉiu

Esperantisto

devas posedi

NUR TIU PERSONO, KIU POSEDAS KAJ UZAS ĈI-TIUN VORTARON, MERITAS LA BELAN NOMON: SERIOZA ESPERANTISTO!

**Somnambulo.** Homo nerve malsana, kiu dum dormo senkonscie k senmemore iras, parolas k agas kvazaŭ li estus maldominanta k konscia. Kp LUNATIKO.

\* **Soni** (ntr). 1 Estligi aŭdeblan aervibradon: *barelo malplena ~as plej laŭle Z* (tiu plej fanfaronas, kiu malplej meritas); *la londilo ~is akre Z*; *~is tamburoj k flutoj B*; *en la radianta aero la birdoj ~is B*; *la horloĝo ~is tri kvaronojn Z*; *denove ek~is krakoj Z*; *voĉo ek~is de malproksime B*; *ek~is voko K*; *ek~is rapidaj paŝoj B*; *subite ek~is tamburado k fajfado Z*; *tiu ĉi frazo estas nur bele ~anta kolekto da vortoj Z*; *aplundoj londre rul~is tra la pleneĝa salono*; *el inter la branĉoj la birdoj ~igas sian voĉon Z*. Kp SONORI. 2 Aŭdeble esprimi: *en la malaltaj tonoj de lia voĉo ~is kvazaŭ malkontenteco Z*; *denove ~os en la urbo la lingvo de Z*; *tiu ĉi sama peco en stilo esp-a ~us tiamanere Z*. ~o. Aŭdebla aervibrado: *harmoniaj ~oj*; *movi sen~e la lipojn Z*. **Re~i** (x). Resendi la ~on: *kia ~o, lia re~o Z*; *l' aero re~is de bruo terura*; *nur ĉio senanima re~adis miajn plendojn Z*; *la impresoj de tiuj tagoj ankoraŭ re~as ĉie en niaj animoj*; *\* bonan nokton \* re~igis la amaselo K*; *liaj verkoj trovas varman re~on en la koroj de la legantoj* (Kp VĤI, SONORI). **Post~i**. 1 Re~i. 2 Sonori. ~anto (Fon). Sonoro naskita de la vibrado de l' voĉkordoj, modifita per la formo de la buŝo k akompanata aŭ ne per bruero. La ~antoj estas daŭrigeblaj k prononcataj kun formiĝo de re~ujo en la buŝo; ili diferencigas de la konsonantoj per tio, ke ili estas silabigaj (Kp VOKALO, KVAZAŬVOKALO, NAZALO, LĤIKVIDO, SILABO).

**Sonato.** Muzikverko por instrumentoj konsistanta el tri aŭ kvar partoj kun malsamaj movoj.

**Sondi** (tr). 1 Mezuri per tiucela aparato la profundecon de akvo aŭ grundo. 2 Esplori per tiucela aparato la fundon de akvo aŭ de grundo. 3 (f) Prove esplori: *mi ~as ĉe la kortego Z*; *~i la opinionon*.

**Soneto.** Versaĵo konsistanta el 14 versoj dividitaj en 2 verskvarojn k 2 verstriojn.

\* **Sonĝo.** Bildoj k ideoj, plej ofte senordaj k senlogikaj, aperantaj en nia imago dum dormo: *mi havis tre*

*strangan ~on Z*; *~o teruras, ~o jorkuras Z*. Kp DELIRO, FANTAZIO, REVO, ILUZIO, IMAGO. ~I (tr). Vidi image dum la dormo: *kiel malsatanto ~as, ke li manĝas Z*; *~i ~is, kvazaŭ ~i estas ankoraŭ juna knabino K*.

\* **Sonori** (ntr) (pp ilo). Produkti sonon daŭre aŭdigan post ĉeso de ĝia kaŭzo: *ĉiuj ~iloj de preĝejoj ~is Z*; *en la palacoj ~as luksaj festenoj B*; *~a (facile ĝis malproksime aŭdebla) voĉo*; *la entreprenon antaŭ ĉio pereigis ~oj* (f: monaĵ) *kaŭzoj k la elsekiĝo de materialaj fontoj Z*; *mi faras tian faron, ke al ĉiu, kiu tion aŭdos, ek~os ambaŭ liaj oreloj Z*. Kp SONI, TINTI, VIBRI. ~o. 1 Sono daŭre sonanta post ĉeso de ĝia kaŭzo. 2 (Fon) Regule vibranta sono, havanta diferencigeblan altecon (Kp TONO, BRUERO, VOKALO). ~igi (pp homo estiganta ~on per ilo). Kaŭzi ~on: *bonvolu ~igi al la servisto*. ~igisto. Homo, metie ~iganta la ~ilojn de preĝejo. ~etigi (la glasojn). Interfrapi la glasojn antaŭ ol trinki je honoro de iu aŭ io. ~ilo. Ilo por estigi ~on, generale konsistanta el metala kava duonsfero kun svingebla frapilo. ~ilejo, ~ilturo. Turo enhavanta ~ilojn.

\* **Sopiri** (x). 1 Suferi pro bedaŭro k rezeiro al io perdita: *~i al la patrolando B*, *al la hejmo, al la ripozo, trankvilo B*; *~i la perditan feliĉon Z*, *pri Z*, *pro Z*, *je la perdita feliĉo Z*; *~i iun Z*; *li lerure ~is vidi sin denove Z*; *tien ili ~as per sia animo reveni Z*; *rano eĉ en palaco ~as pri marĉo Z*. 2 Suferi k malĝoji pri ia dezirego: *kiel cervo ~as al fluanta akvo, tiel mia animo ~as al Dio Z*; *li ~is senmezure pri la morgaŭa tago Z*; *~i pri pli altaj spiritoj plezuroj Z*; *nullaj homoj ~as je flugiloj k lute forgesas, ke piedojn ili havas*. 3 Esprimi per forta longa enspiro aŭ per plenda ĝemo sian bedaŭron aŭ deziregon: *~e diri B*; *~e silenti*. ~o. 1 Stato de iu, kiu estas ~anta: *lin ekregis neesprimebla ~o*. Kp ASPIRO, MELANKOLIO. 2 ~ĝemo: *legendoj, kiuj estas kvazaŭ ~oj de l' homaro B*.

\* **Soprano.** Plej alta voĉo de virino aŭ juna knabo.

\* **Sorbi** (tr). 1 (iu) Enspirante altiri fluojn ion post ion en sian buŝon: *~i krudan ovon*; (f): *multe da ĝojo k de malhela aflikto ni senkonsidere ~is el la*

Wilt ge steeds veel volk op uw vergaderingen? — Geef een uurtje FILM!

Het Katholiek Smalfilm Studio van Antwerpen biedt U een interessante keuze van documentair- speel- en tekenfilms.

Specialiteit van reportages: 17e IJzerbedevaart. VI. Nat. Zangfeesten. Pater Damiaanfeesten enz. Meer dan 600 referenties.

Vraag gratis uitgebreide geïllustreerde kataloog aan:

KATH. SMALFILM STUDIO, 32, OUDE BEURS, ANTWERPEN

La plej rekomendindaj originalaj

verkoj en Esperanto

estas la verkoj de la plej populara esperantisto-verkisto:

**JULIO BAGHY.**

Ĉu por distro, ĉu por studo, ĉu por ekzameno, tutegale, liajn verkojn vi legu!

Jen la titoloj kaj prezoj:

	Bind.	Broŝ.
Preter la Vivo ...	Fr. 24.—	Fr. 17.—
Sur sanga tero ...	Fr. 58.—	Fr. 45.—
Verdaj donkiĥotoj	Fr. 34.—	Fr. 24.—
La vagabondo kan-		
tas .....	Fr. 26.—	Fr. 16.—
La Verda Koro ...	Fr. 36.—	Fr. 16.50
Printempo en la		
aŭtuno .....	Fr. —.—	Fr. 12.—
Teatra Korbo .....	Fr. —.—	Fr. 13.—
Aliaj tre rekomendindaj libroj estas:		
Leerboek voor Esperanto, de		
D-ro F. Szilagyí .....	Fr. 11.—	
Ellernu, daŭriga kurso, de		
D-ro F. Szilagyí .....	Fr. 16.—	
Plena Gramatiko de Espe-		
ranto, de K. Kalocsay ...	Fr. 84.—	
Haveblaj ĉe nia Vendinstituto, D. Mortelmans, 14, Egied Segerslaan, Wilrijk. Poŝtĉekkonto No 1194.82.		

## ĈIU ESPERANTISTO

nepre havigu al si la plej bonan verkon de nia fama verkistino

1°) MARIE KOENEN, el la ned. lingvo trad. de P. CH. M. v. d. Vijver: *La Sunkrono*. prezo: *belgaj frankoj 13.* — broŝ.: *fr. 25.* — bind.

El recenzoj: ... Maar als je eens goed Esperanto wilt lezen, dan kan ik je dit boek aanbevelen... (De Jonge Wacht). ... Bela nova libro kiu entenas bonege tradukitan rakonton..... (La Praktiko). ... La Sun-

## Senpage!

vi ricevos senpage je la valoro de 15 fr. bonajn poŝtmarkojn de 15 diversaj landoj (laŭ la plej lasta katalogo de Yvert) se vi abonas la

## REVUO INTERNACIA

de poŝtmarkinterŝanĝo kaj Turismo

Ĝi aperas 8-foje ĉiujare, 20 - 30-paĝa, riĉe ilustrita, kaj donas regule kaj artajn suplementojn kaj pm-donacojn, kaj kronikon kompletan de la novaj eldonaĵoj, kaj la liston de la membroj.

ĈIU ABONANTO RAJTAS 5 INTERŜANGANONCOJN SENPAGAJN.

Abonprezo: 15 frankaj belgaj,

pagotaj per poŝtmandato aŭ banko al JOS. PHILIPPEN,

Botermarkt 10 DIEST

krono en Esperanto estas leginda, eĉ tre leginda libro... (N. K.) Kiel ekzemplo de aita nederlanda literaturo, certe rekomendinda verko (Flandra Katoliko).

2°) *La Najtingalo*, dua eldono. Plej ŝatata Esp. kantaro. La unua eldono finvendigis en tri tagoj.

..... mi ne povas ne konsili: tuj aĉetu ĝin kaj kantadu por ke la krizo cedu! (Radioaro). Prezo nur fr. 2,50.

Eldonis: Esperanto Instituto MALNOVA TURO, Eindhoven — Ned. Mendebila pere de nia filialisto D. Mortelmans, E. Segerslaan, 14, Wilrijk. P-konto n° 119.482.

## PLENA VORTARO de Esperanto

Verkita de: PROF. E. GROSJEAN-MAUPIN, direktoro de la sekcio «Komuna Vortaro» ĉe la Esp-ista Akademio; A. ESSELIN; S. GRENKAMP-KORNFELD; PROF. G. WARINGHIEN; membroj de la Esp-ista Lingvo Komitato.

Dua eldono 512 paĝoj Formato: 15 x 20 1/2 cm. En verda tola bindo kun ora surpraso.

Ĉi-tiu vortaro estas verkata tute en Esperanto. En ĝi la vortoj ne estas tradukitaj, sed en la lingvo Esperanto mem klarigitaj. Multaj ekzemploj, ĉerpitaj el la verkaro de Zamenhof kaj el verkoj de aliaj eminentaj verkistoj, montras la ĝustan kaj modelan uzadon de la vortoj. Ĉe la prepozicioj, prefiksoj, sufiksoj k.t.p. estas aldonitaj detalaj gramatikaj klarigoj pri ilia uzado.

Vendoinstituto de F.U.K.E. Eg. Segerslaan 14, Wilrijk.

## Goedkoope en gezonde Wereld literatuur

Een reeks van 8 prachtboeken  
300 bladz., voor 80 fr. slechts!

Reeks 1935: werken van Lagerlöf, Kipling, Undset, enz.  
Reeks 1936: „ „ Heidenstamm, Järnefelt, enz.  
Reeks 1937: „ „ Lie, Muls, Gijsen, Gogol, enz.

### REEKS 1938 : 80 FR. VOOR 8 BOEKEN.

- |                                |                        |
|--------------------------------|------------------------|
| 1. Twaalf Stoelen              | E. Katejew en Ilja Iif |
| 2. De Doode Waterval           | Per Hallström          |
| 3. Valerius de Saedeleer       | A. De Ridder           |
| 4. Gazsi Hazenpeper            | Jeno Terzansky         |
| 5. Het Huis in 't Heilig Bloed | M. Moretti             |
| 6. De Verzegelde Engel         | Lesskow                |
| 7. Droogte                     | Van den Heever         |
| 8. Een Spook op Zolder         | M. Mathys              |

### REEKS 1934 : NOG BESCHIKBAAR AAN 6 FR.

- |                                |                  |
|--------------------------------|------------------|
| 1. Rietvelde                   | Dr Van Driessche |
| 2. Ommegang                    | Lode Baekelmans  |
| 3. De Kroniek van 't Grieshuus | Storm Theodoor   |

*PRIJZEN GELDEN VOOR BINNENLAND*

Vraagt uitgebreide prospectus en bestel bij

L. CALLOENS. Erembodegemstr. 29, Aalst

FLANDRAJ  
ESPERANTISTOJ



EN ROESELARE  
ESTAS LA DE VI  
PREFERATA

# PRESEJO

## H. & H. BRAEKEVELT


Statiedreef, 177 - Tel. 1080

Iedere groep, vereniging of zakenman gebruikte vóór elk order onzen dienst voor inlichtingen en schetsen.

**Specialiteit :**  
**ESPERANTO - DRUKWERK**

## Imperial

Schrijfmachienen zijn de beste



Engelsch

Fabriikaat

Bureelmodel & draagbaar model  
ROESTVRIJ

Het meest MODERNE Schrijfmachien  
2 JAAR WAARBORG

Eerste klas schrijflinten voor alle merken van schrijfmachienen & rekenmachienen. - Ellam's carbonpapier - Ellam's duplicatoren, stencils en inkten.

Bijzonder werkhuis voor herstellingen aan alle schrijf- en rekenmachienen.

**TOBIE DE PRINS** Tel. 216.20

● 32, Kathelijnevest, ANTWERPEN ●

# FLANDRA

4e Jaargang, 1939

April Nr 5



# KATOLIKO

MAANDSCHRIFT VAN HET  
KATHOLIEK VLAAMSCH ESPERANTO VERBOND

## POR DISTRA HORO

la plej taŭgaj libroj en Esperanto estas

la "EPOKO"-libroj

La libroj enhavas interesajn, malenuigajn romanojn.  
Ĉiu libro enhavas 192 paĝojn, laŭ formato 18 x 11.5 cm.  
Preso klara — bindo kartona — papero bonkvalita

- |  |   |
|--|---|
| 1. MURDO EN LA ORIENTA EKSPRESO. Agatha Christie.<br>El la angla originalo tradukis « Etulo ». | Badash.   |
| 2. LA KNABOJ DE PAULO-STRATO. F. Molnar.<br>El la hungara originalo tradukis L. Spierer.       | 4. LA TEMPO-MASINO. H. G. Wells.<br>El la angla originalo tradukis E. W. Amos.                  |
| 3. LA PRINCO KAJ BETTY. P. G. Wodehouse.<br>El la angla originalo tradukis G.                  | 5. PRINCINO DE MARSO. Edgar Rice Burroughs.<br>El la usona originalo tradukis K. R. C. Sturmer. |
|  | 6. COLOMBA. Prosper Mérimée.<br>El la franca originalo tradukis Prof. J. Beau.                  |

Prezo de ĉiu libro Fr. 12.—, afrankite.

La ses libroj kune por Fr. 65.—, afrankite.

Eldonitaj de THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY, LTD., ANGLUJO.

Mendu ĉe F.U.K.E., 14, Egied Segerslaan, Wilrijk.